XXIV-e Jrg. No. 5 Mei 1959

V-19491/24

NEDERLANDA ESPERANTISTO

MAANDBLAD VAN DE NEDERL. ESPERANTISTEN-VERENIGING
„LA ESTONTO ESTAS NIA"
Onder redactie van het Hoofdbestuur

REDACTEUR:
F. Weeke
IJsseldijk 20, Diepenveen

Voor leden gratis.

ADMINISTRATEUR:
P. M. Mabesoone
Pythagorasstr.122,Amsterdam-O.

Grandioza amas-manifestacio!

PLI OL 1800 NE-ESPERANTISTOJ SEKVIS PROV-LECIONON DE S-RO CSEH!

Vendredon, la 20-an de marto pasinta, ariĝis en la granda salono de la „Dierentuin" en Hago la gepartoprenantoj en la „Posthoorn"-kurso kaj kelkdekoj da gemembroj de la Haga kaj Roterdama sekcioj.

La kunveno (kontakt-kunveno) estis organizita de nia nelacigebla ano, s-ro H. Kervers, la gvidanto de la kurso en la „Posthoorn".

Tiu organizado ne estis bagatelo, kontraŭe, sed la rezultato estis grandioza!

Mi havis la honoron reprezenti la ĉefestraron kaj kiam mi eniris la salonon, mi ne povis kredi miajn okulojn! Plenplena salono, eĉ sur la balkono sidis pluraj gevizitantoj. Tiuj, kiuj konas la grandan salonon de la „Dierentuin", scias, kion signifas „plen-plena"! Certe 2000 personoj ĉeestis!

Post la bonvenigaj vortoj de s-ro Kervers la scivolaj gevizitantoj streĉe aŭskultis la lecionon de s-ro Cseh. En sia bonveniga parolado s-ro Kervers klarigis la celon de la kunveno. La gekursanoj ĝis nun, li proksimume diris, lernis nur legi, sed estas necese, ke ili ankaŭ aŭdu kiel Esperanto sonas kaj ke ili mem parolu. Por tio s-ro Cseh estis invitata doni prov.-lecionon en la konversacio.

Estis por s-ro Cseh emocia momento, ĉar li neniam antaŭe donis konversacian lecionon al tiom da personoj samtempe. Pri la maniero, laŭ kiu li instruis, mi ne bezonas uzi multajn vortojn. Estis grandioze, instige, sprite, inspire. Entuziasmoplene la aŭskultantaro reagis. Ne estas mirige, ke tondra aplaŭdo eksplodis post la fino de la leciono. S-ino Isbrücker interpretis, kiam necesis.

Post la paŭzo parolis f-ino Vermaas. Ŝia parolado fakte estis ĝenerala respondo pri multaj demandoj, kiuj envenis ĉe s-ro Kervers. Klare kaj vigle ŝi donis superrigardon de la Esp.-movado. Ankaŭ ŝi devis enkasigi fortan aplaŭdon. S-ro Calado sekvis ŝin kaj rakontis laŭ amuza maniero, kiel li konatiĝis kun sia edzino. Kompreneble pere de Esperanto. Estis mallonga, sed bonega rakonto kaj la geaŭskultantoj streĉe sekvis liajn vortojn. S-ino Isbrücker zorgis por senmakula traduko, ĉar s-ro Calado kompreneble parolis nur Esp.-lingve. Li ja estas Portugalo?

Fin-fine s-ino Kervers instigis al komuna kantado. La kanto (12 strofoj!) estis anoncata kiel „Posthoorn"-kanto kaj la melodio estas la konata Esp.-kanto: „Vivu la verda stel'". Ne estas eble presigi la tutan kanton en nian organon. Vigle kaj kun kreskanta entuziasmo oni kantis. La enhavo de la kanto estas laŭdo al la „Posthoorn" kaj instigo por daŭrigi la lernadon de Esperanto.

Neniam dum mia multjara praktiko de Esperanto mi vidis tiom da entuziasmoplenaj homoj en kunveno ne-esperantista. Elkore mi esperas, ke la fina rezultato de la kurso estos same kontentiga kiel la kontaktvespero. La intenco de s-ro Kervers estas organizi post ĉiuj 6 lecionoj samspecan vesperon. Ĉu la aliaj kontakt-

6-a Beneluksa Esperanto-Kongreso

16 - 17 kaj 18 majo en Haarlem.

Ni ricevis la informon, ke okazos *Esperanta Diservo* la 17-an de majo 1959 matene je la 9-a horo en la Remonstrantse Kerk, Wilhelminastraat, atingebla per linio 3, proksime al la kongresejo. Predikanto: s-ro W. H. Koopmans. Solkantistino: s-ino Jelly Koopmans-Schotanus, kiu kantos Arion de Händel, la Pentekostan kanteton de Bach kaj Ĝojon (la finhoron el la 9-a Simfonio de Beethoven).

Organisto: s-ro D. Schipper, Hilversum.

Ankoraŭ nur kelkaj semajnoj (eble tagoj, dependos de la apero de N.E.) disigas nin de la kongreso.

Denove Haarlem akceptos aron da geesperantistoj en- kaj eksterlandaj. Jes, efektive, nia 6-a fariĝos iom internacia, ĉar grupo da anglaj infanoj (14- ĝis 17-jaraj) kun la gvidanto sin anoncis por la kongreso. Verŝajne venos ankaŭ aliaj geeksterlandanoj. „Kaj la belgoj, ĉu vi forgesas ilin?" vi eble demandas. Ne, ni ne forgesis ilin, certe ne, sed ni ne konsideras ilin „geeksterlandanoj". Ĉu ili ne certagrade apartenas al la sama gento kiel ni? Cetere, ni estas „geesperantistoj", do, gemondcivitanoj. La L.K.K. havas grandan zorgon, sed feliĉe ĝi ne povas influi tion. Nome: la vetero. Jes, estas ĉiutaga klaĉado: la vetero, sed, dependas multe de la vetero. Kiam la suno brilas, ankaŭ la homo estas gaja; kiam la ĉielo estas nubokovrita, la humoro de la homo estas morna. Tial, karaj gekongresanoj, agu laŭ la konata nederlanda kutimo kaj poleksumu („duimen"), por ke „Pluvius" estu favora al ni. Cetere, pli bone estas, ke ni ignoru la veteron. La vera etoso venas de interne, ne de ekstere. Kiam ĉiu iros al Haarlem kun la firma volo pasigi agrablajn tagojn, tiam la vetero ne povos ĝeni nin.

Haarlem atendas vin! Haarlem ĝojos akcepti vin! Vi estos tutkore bonvenaj!

---

vesperoj estos same grandiozaj? Ni esperu, ke jes. S-ro Kervers certe meritas tion. Koran dankon kaj gratulon pro ĉio, kion vi faris, s-ro Kervers!

Lupo.

Demonstracia Kongreso

„Zamenhofkongreso 1859-1959"

26/27 de septembro 1959 en Utrecht.

N.C.K.E. decidis okazigi demonstracian kongreson en la kadro de la Zamenhofa jaro sub la nomo „Zamenhof-kongreso 1859 - 1959". Ĝi okazos je la 26-a kaj 27-a de septembro 1959 en Utrecht. La partoprenkostoj estas ĉe anoncado en majo 3.— gld, en junio 4.— gld kaj post la 1-a de julio 5.— gld. La kongreso komenciĝos sabatotagmeze kaj finiĝos dimanĉmatene. Kiom eble plej multe da gepartoprenontoj gastloĝos ĉe Esperantistoj. Frua anonco pro tio estas dezirinda! Baldaŭ la gemembroj de la organizoj kunlaborantaj en N.C.K.E. ricevos detalan aliĝilon. Administranto de la kongreso estas s-ro G. H. Koudijs, Paulus Potterstr. 16, Utrecht. Ĝirokonto n-ro 182279. Ni instigas ĉiujn geesperantistojn nepre partopreni ĉi tiun unikan kongreson, por ke ĝi estu kiom eble plej impona kaj atestu pri la forto de nia Esperanto-movado.

La sekretario de N.C.K.E.:
A. M. D. KORFF,
Hengelolaan 1027, Den Haag,
tel.: 662007.

Junalara Monda Festivalo

En Aŭstrio okazos de la 26-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto la 7-a Junulara Mondfestivalo.

Jam nun laboras en la kadro de la festivalkomitato grupo da geesperantistoj por prepari la renkontiĝon de la gesamideanoj okazontan la 28-an de julio de la kuranta jaro en Vieno.

En la konstanta komisiono estas gereprezentantoj de diversaj politikaj tendencoj kaj religiaj konfesoj el 54 landoj. Krome ĝi estas malfermita por ĉiu organizo sendepende je kiu etapo estas la festivalpreparoj. La programo estas tre riĉenhava kiel ankaŭ tiu de la Esperanta renkontiĝo. Dependos nur de la geesperantistoj mem, ĉu ili faros ankoraŭ pli riĉan kaj interesan programon.

Jam nun anoncis sin 17000 gepartoprenontoj el 130 landoj, kiuj reprezentos ĉirkaŭ 1000 diversajn junularajn organizojn.

Menciinda estas la sinanonco de 400-membra kaj 800-membra delegacioj respektive el USONO kaj SOVJETUNIO.

Tutmonda Esp. Ĵurnalista Asocio

Profesiuloj. (T. E. Ĵ. A.) Amatoroj.

Peranto: S-ro A. A. Leenhard, Boerhaavelaan 18, Bussum, Nederlando.

I.a.: La delegitoj de la brazila junularo aranĝos grandan fotoekpozicion dediĉotan al la brazila arkitekturo kaj la ĉefurbo de Brazilo, Rio de Janeiro. Partoprenos la festivalon kun apartaj naciaj programoj, konsistantaj el kantoj kaj dancoj, pli ol dek landoj. Sportaj amatoroj pace konkurados por la sporta insigno de la festivalo.

La kvara festivaltago apartenos al la gestudentoj. En la provizora programo estas antaŭviditaj 5 internaciaj studentaj seminarioj: Pri la sistemo de la supera edukado — Pri la problemoj de la teknika progreso kaj ĝiaj kunligoj kun la homara antaŭeniro — Pri la paca utiligo de la atoma energio — Pri la ekonomiaj problemoj de la koloniaj kaj nesufiĉe evoluintaj landoj — La rolo de la studentoj kaj iliaj organizoj en la socia vivo. Paralele kun tiuj seminarioj oni povos renkontiĝi kun alilandaj kolegoj pri kemio, medicino, arkitekturo, filozofio, fiziko k.t.p. Ankaŭ „Internacia Studenta Klubo" funkcios.

Por helpi la delegaciojn el malproksimaj landoj la viena junularo kolektas monon. Ĉiu partoprenonto volas esprimi sian batalpretecon el solidareco kaj amikeco inter la diversnaciaj gejunuloj.

Anton A. Leenhard.

El Niaj Sekcioj

Amsterdam.

Sekr.: Uithoornstraat 51.

Kvar junaj germanaj samideanoj agrable interrompis la programon de la klubvespero de U.A.S.E. je la 17-a de marto. Oni interbabilis kaj la gastoj rakontis pri la plifortigo de la Esperanto-grupo Oldenburg, kies estraron bedaŭrinde baldaŭ devos forlasi, pro militservo kaj studo, kelkaj aktivaj junuloj. Post la tetrinkado la gastoj, sub gvido de s-ro Ruig, foriris por rigardi Amsterdamon.

Pri sia prelegvojaĝo en Danujo, „U.E.A., la garantianto de nia venko", s-ro Pragano rakontos en nia kunvenejo, Pieter Baststraat 3, *la 12-an de majo.* Li tiam parolos ankaŭ pri „La jubilea kongreso en Varsovio". Ĉiuj geesperantistoj estos bonvenaj.

Arnhema Kunlaborkomitato

aranĝos la 30-an kaj 31-an de majo 1959 Semajnfinan Renkontiĝon en salono de „De Schelmsche Brug", Arnhemo. La programo estos tre alloga, i.a. teatraĵeto de infangrupo, muziko kaj kantado, demandludo, prelego de s-ro Maur. Jaumotte, prez. de la Reĝa Belga Ligo Esperantista pri „La homo Zamenhof kaj lia homaranismo", vizito al la „Subĉiela Muzeo k.t.p. Sabatposttagmeze je la 15-a horo okazos la jarkunveno de „Universala Ligo" en la sama salono kaj je la 16.30 d-ino C. M. Burger el Harlemo prelegos pri sia vojaĝo al Izraelo. La kostoj por la gepartoprenontoj estas F. 1,50. Por viziti nur la kunvenon F. 0,90. Oni petu aliĝilon kun informoj, ankaŭ pri tranoktado, de la sekretario, s-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhemo, Nederlando.

P.S. Ni sciigas al la gelegantoj de la organo „De Esperantist", ke en la aprila numero la dato de ĉi tiu renkontiĝo estas erare menciita. La ĝusta dato estas la supre nomita.

SEKCIO ZEIST

Cent geĉeestantoj festis la printempan tagon!!! Inter ili proksimume 40 gejunuloj. Tre kontenta estas la estraro de la Zeista sekcio de LEEN. Posttagmeze granda grupo da gejunuloj faris promenadon por rigardi la plej interesajn partojn de la vilaĝo. Ĉiuj revenis tre kontentaj je la sesa en la salonon „Cosy Home". La geanoj de la Zeista junulargrupo regalis siajn gegastojn el diversaj urboj i.a. Arnhem, Amersfoort, Den Haag, Leiden, Rotterdam, Utrecht k.t.p. per kafo.

Je la oka kaj kvarono la vesperfesto komenciĝis. Post la malfermo fare de la prezidanto ĉiuj kantis la himnon.

La programo estis tute prizorgata de grupo da gejunuloj el Utreĥto kaj Zeist. Oni ĝuis bonegajn deklamadon kaj pianludon kaj amuzan ombroludon. Ankaŭ la muzikgrupo prizorgis bonan sfermuzikon kaj akompanadon de la komuna kantado. La geaktoroj rikoltis multan aplaŭdon.

Ĉiuj gegastoj partoprenis en konkerludo, kiu kaŭzis multe da ĝojo,

BIBLIOGRAFIO

„Sonĝe sub pomarbo"

verkita de Julio Baghy. Triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj. Antaŭparolo de Majorie Boulton. Kovrilo de John Hartley. Dekoracioj de Stefano Barto. Portreto de la aŭtoro. Eldonita de J. Régulo. La Laguna, Kanariaj Insuloj. Formato 16 × 22 cm, broŝurita, 232 paĝoj. Prezo 7,20 gld. Havebla ĉe nia Libro-Servo.

Ŝajnas al ni ne necese prezenti al la nederlanda esperantistaro nian samideanon Julio Baghy, kiu la 13-an de januaro ĉi-jare festis sian 68-an naskiĝdatrevenon kaj nun post longa silentado surprizis nin per la supre nomita verko. Ni estas certaj, ke multaj malnovaj nederlandaj geamikoj de la aŭtoro volas legi ĉi tiun libron, kiu enhavas, en poezia formo, junecan idilion. Estas tre interese konstati, ke Baghy en la daŭro de multaj jaroj perdis nenion de sia esprimkapablo kaj ĉiam denove mirigas nin per sia trafa kaj elokventa vortelekto tiel, ke kvankam verkita en rimitaj versoj, la verko legiĝas kvazaŭ vigla konversacia prozo. Jes, vere, la tuta libro estas konversacio inter du geamantoj, Adamo kaj Eva kaj fantaziaj personoj, kiuj rolas kiel lampiroj, gnomoj, feinoj k.t.p.

Sed la temo de la libro estas la pli malpli filozofia demando pri la „Esto" kaj la „Vivo". Tiel longe, kiel la homo vivas sur la tero, okupas lin la demando pri la Vivo kaj la Morto kaj tio, kio povos sekvi post la morto. Diversaj filozofiaj sistemoj klopodis kaj klopodas respondi tiun demandon, kiu ludas rolon en ĉiu religio. Ankaŭ Baghy fakte pritraktas la saman temon, volvante ĝin en fantaziaj bildoj, kiujn la geamantoj en sonĝo sub pomarbo travivas, kiam ili per sorĉado akiris la senmortecon konsistantan en la nura „Esto" aŭ ekzistado, sed ne plu povas partoprenj en la „Vivo". Ili fariĝas kvazaŭ flankestarantoj ĉe la okazaĵoj de la Vivo. Ili ne plu povas agi, senti, projekti, batali por idealoj kaj esti respondecaj por propraj agoj kaj faroj. Disvolvante sian temon ne estas mirige, ke Baghy de tempo al tempo pensigas nin al libroj kiel „Faŭsto", „Hamleto", „Tragedio de l' Homo" kaj eĉ la Biblio. Kiam la geamamtoj fine vekiĝas el la sonĝo, ili ĝojas, ke ili vere vivas kaj povas agi kaj labori por la nuno kaj por la estonteco. Ni citu pro tio jenan strofon:

ADAMO:

De nun sur sama voj' ni migros,
dum suno ridos, nokto morne nigros.
En harmoni' nin tenos emocio;
vi estas, restas ĉiam - mia Ĉio.
Vi mem sur mia vojo lumos torĉe
al fora celo instiganta dolĉe,
admonos vi al fortostreĉo brava,
heroa eĉ en vivturnir' senglava.
Vi spronos pigan menson penson naski,
persisti, peni, venki, ne fiaski;
el via amo fontos fort' por lukti
por viv' komuna plani kaj produkti.
Aĥ, laŭron por mi, via kavaliro,
edzinja mano donu post turniro.

Fine de la libro troviĝas sufiĉe longa listo da preseraroj kaj kvankam estas en la verko neologismoj, ili ne abundas. Ni povas forte rekomendi la libron.

F. W.

Sennacieca Revuo 1959

estas kajero eldonita de S.A.T. honore al Zamenhof kaj Lanti, la fondinto de S.A.T. La kajero enhavas tre atentindajn artikolojn pri Lanti, la Zamenhofa Homaranismo kaj aliaj temoj. Trafis nin, ke sur la dukolora titolpaĝo de la kovrilo staras la vortoj „redaktata en la lingvo de Zamenhof". Ĉu tio volas diri, ke en aliaj eldonaĵoj de S.A.T. ne troviĝas la lingvo de Zamenhof aŭ ĉu ĝi indikas nur, ke en la kajero ne estas uzata la litero k por kaj, kiel oni ĝenerale faras. Ni povas nur ĝoji pri tio, ĉar la uzado de tiu mallongigo nur malbeligas la tekston. Tre atentindaj estas ankaŭ la artikolo de prof. Lucien Laurat: „Rimarkoj pri la tutmondeco kaj la klasaj celoj de S.A.T." kaj tiu de N. Bartelmes pri „Latineco Triumfanta". La prezo de la kajero estas 2,20 gld.

Ridet estas la mallongigo de „Rondo Internacia De Esperantistoj-Tradukistoj" kaj samtempe la nomo de la kajeroj, kiujn tiu Rondo de tempo al tempo eldonas. Tiuj kajeroj estas stencilitaj kaj la enhavo konsistas el diversaj kontribuaĵoj, kiujn la gemembroj ensendis. La celo de la Rondo estas instigi la geesperantistojn en la tuta mondo pli multe uzi nian lingvon per verkado aŭ tradukado. La enhavo de la tria kajero, kiun ni ricevis, estas vere internacia kaj interesa. Se oni volas pli spertiĝi en nia lingvo, oni nepre aliĝu al „Ridet", kies sekretario kaj administranto estas s-ro J. M. J. Driesen, Sam. Mullerstr. 7a, Rotterdam 6, Nederlando, kiu volonte donos pluajn informojn.

---

ridado, eĉ tumulto. Finfine balo ĝis la dek unua kaj duono.

Tre kontentigitaj ĉiuj iris hejmen kaj certe poste rememoros ĉi tiun sukcesplenan kaj agrablan restadon en Zeist.

44-a Universala Kongreso de Esperanto

Varsovio — 1 ĝis 8 aŭgusto 1959 — Pollando

Jubilea Zamenhofa Jaro

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de la Pola Popola Respubliko

JOZEF CYRANKIEWICZ

FERVOJA RABATO:

La 33%-a fervoja rabato de la polaj fervojoj estas ricevebla je aĉeto de la vojaĝbileto, en la koncerna lando, kontraŭ prezento de la kongreskarto. La polaj fervojoj jam informis la direkciojn de la eksterlandaj fervojoj per letero de la 5-a de marto CZP. 14/25/7/59.

KONGRESA RADIO:

Informoj pri la kongresaj preparoj estas donataj ĉiusabate en la radiodissendo „Voĉo de la 44-a", kiu okazas en la kadro de la ĉiutaga duonhora programo en Esperanto de la Pola Radio sur mallongaj ondoj 25,05 m., 25,20 m., 25,39., 30,98 m., 31,45 m., 31,50 m., 41,12 m., 42,11 m., kaj sur mezaj ondoj 249 m. (1205 kc/s) de la 16.30 h. ĝis la 17-a h.

STATISTIKO:

(ĝis fino de marto): Afriko Suda 1, Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 32, Belgujo 22, Brazilo 4, Britujo 80, Bulgarujo 123, Ĉeĥoslovakio 5, Cejlono 1, Danlando 46, Etiopio 1, Finnlando 30, Francujo 130, Germanujo 76, Hispanujo 9, Hungarujo 14, Indonezio 1, Islando 2, Italujo 93, Izraelo 4, Japanujo 3, Jugoslavio 35, Kanado 2, Maroko 4, Meksiko 2, Monako 5, Nederlando 66, Norvegujo 16, Novzelando 5, Pollando 951, Portugalio 2, Rumanujo 2, Sovetunio 14, Svedujo 107, Svisujo 24, Turkujo 3, Urugvajo 1, Usono 13. Entute 1935 el 40 landoj. (Pasintjare 1447 el 33 landoj).

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario.

LA LIBRO DE LA MONATO

„TAGLIBRO DE ANNE FRANK",

volumo 216-paĝa kun 7 tutpaĝaj ilustraĵoj, bindita en verda tolo kun ora surpreso.
Traduko laŭ la nederlanda originalo de G. J. Degenkamp.
Milionoj ĝin legis,
milionojn ĝi emociis!! f 7,80.

Ripeto pri lastatempaj novaĵoj:

„ESPERANTA ANTOLOGIO",

poemoj 1887 - 1957 kolektitaj de W. Auld. Pli ol 350 poemoj de 90 poetoj el 35 landoj, el ĉiuj kontinentoj.
Tolbindita kun ora surpreso f 16,50, broŝ. f 13,75.

„RETORIKO",

de I. Lapenna.
Ĝi enhavas du partojn: I. Lingvo — II. Retoriko. Kun antaŭparoloj de R. Rosetti al la unua eldono kaj G. Waringhien al la dua eldono.
Paroladoj de Brutus kaj Antonio (el „Julio Cezaro"), Zamenhof, E. Privat kaj la aŭtoro.
Tolbindita kun ora surpreso f 11,—, broŝ. f 9,—.

Libroservo L.E.E.N., Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O

Atentu!

De la 16-a de majo ĝis la 10-a de junio ĝi funkcios nur kun prokrasto pro eksterurbeco de la administrantino.

Korespond-Adresoj

La esperantista grupo „Bona Stelo", 31 Rue Pêcherie, Romans (Drôme), Francujo, serĉas gekorespondantojn por siaj gelernantoj 15- ĝis 30-jaraj. Oni skribu aĝon, deziron kaj emon al suprenomita adreso.

Attelo Csatáry, 17-jara hungaro serĉas samaĝan korespondantinon nederlandan. Adreso *Györ*, Kenyérköz 3, Hungarujo.

Gorazeev Vladimir, Opitij uĉastok, Abonem, jaŝĉik N 25, Magadam, Sovet-Unio, pensiulo, plantamatoro, il. gaz., helpas en studado ruslingva.

LA STUDANTO

Jen ekzempla traduko de

Ekzerco 55 A:

GESTRAFTE NIEUWSGIERIGHEID.

Op de tafel lag *1)* een boek en daaronder *2)* sliep een hond. De heer Leesgraag *3)* zag het boek en was nieuwsgierig ernaar *2)*. Hij wenste te weten, waarover *2)* het boek handelde (ging) en wie de schrijver ervan*4)* was *5)*. Noch zag de heer L. de hond, noch hoorde hij *6)* zijn *7)* ademhaling. Hij was een beetje doof, waardoor *2)* hij soms onaangenaamheden (narigheden) ondervond. Omdat hij alleen in de wachtkamer was (Alleen in de wachtkamer zijnde), wilde hij zijn wachttijd door(zoek-)brengen door in het boek te bladeren (met het doorbladeren van het boek). Omdat hij strak naar het boek keek, merkte hij de staart van de hond niet op. Nadat hij daarop *2)* gestapt was (getrapt had) *8)*, hoorde hij ondanks zijn doofheid een vreesaanjagend gegrom *9)*. Verschrikt rende hij naar de deur met een niet meer hele (volledige) broek: een deel van een van de pijpen ervan *4)* was in de bek van de woedende hond.

1: Dit werkwoord moet ook in de verleden tijd staan: „kuŝas" is een tik- of drukfout. Het hele verhaal staat in de onvoltooid verleden tijd.

2: Waar het woord Esperanto een voorzetsel en een voornaamwoord heeft, heeft het Ned. een voornaamwoordelijk bijwoord, als het dingen betreft: daaronder, ernaar, waarover, waardoor, daarop enz.

3: De naam Legemulo mag ook blijven staan. Namen vertaalt men gewoonlijk niet, maar deze was erg doorzichtig, net als „La Lupo"....

4: Bij dingen is een voornaamwoordelijk bijwoord beter dan een bezittelijk vnw.

5: In 't Ned. komt een bijzin in de indirekte rede in de verleden of verleden toekomende tijd, als de hoofdzin in de verleden tijd staat.

6. Door de dubbele ontkenning moet deze zin wel een beetje omgezet en hier „hij" toegevoegd worden.

7: Bij een dier gebruikt men wel een persoonlijk of bezittelijk vnw. Vergelijk noot 2.

8: De deelwoordsvorm „-inte" eist in het Nederlands een voltooide werkwoordsvorm, hier v.v.t., omdat de hoofdzin ook in de v.t. staat. Dus niet: Toen hij erop trapte. Wel kan: Na er op gestapt te zijn (getrapt te hebben).

9: De laatste letter van „grumblom" moest een n zijn. Een drukfoutje.

Jen ekzempla traduko de

Ekzerco 54 B:

EEN SPREKENDE HOND.

Een korrespondent van mij uit Praag schreef over een buitengewoon geval, dat de wetenschappelijke wereld in opschudding begint te brengen: een zich normaal ontwikkelende jonge hond sprak plotseling uit zich zelf een lettergreep uit door zijn baas een snoepje te vragen. De heer T. begon het diertje te oefenen door het afzonderlijke (losse) woorden vóór te zeggen en na niet te lange tijd slaagde hij erin (gelukte het hem) het inderdaad (werkelijk) te laten spreken.

Het hondje is nu 14 maanden (oud) en reageert juist op de toespelingen (aanduidingen); het zegt „Goede avond!" tot de bezoekers, spreekt zeer duidelijk zijn naam „Korinka" en enige andere woorden in de Tsjechische taal uit. Zijn stem klinkt zeer aangenaam welluidend (harmonieus); het blaft alleen op de vraag of het een hond is. De hele vertoning lijkt heel natuurlijk en doet geenszins denken aan dressuur en oefendwang; liever zou men zeggen, dat Korinka een nieuw slag (type) diertje is met een opmerkelijke (merkwaardige) verhoogde (hoge) intelligentie. Nieuwe woorden leert het overigens zeer vlug, soms zelfs na een slechts een paar maal voordoen (aanwijzen) en het verbetert oplettend zonder te veel aandrang verkeerd geuite medeklinkers. De klinkers zijn wat minder helder, omdat zij achterlijker (meer achter) in de bek ontstaan dan bij de mensen.

Mijn korrespondent, de heer Ŝtefano Urban, heeft zelf het hondje van dichtbij gezien. Het verslag is dus geloofwaardig (echt, onvervalst).

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn japana knabino, 13-jara, *YUKA MATUDA*, 41-402 Siga-Star-House, Kitaku, Nagoya, Japanujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, bildkartojn kaj „alumetsurgluaĵojn": *Kolekcjoner Klub Raczek*, LODZ, Piotrkowska 211, Polujo.

Esperantista geedziĝo.

Ni sciiĝis, ke la 10-an de aprilo 1959 geedziĝis s-ro Roel Mussche, membro de nia amsterdama sekcio, kaj f-ino Julia van de Bos, membrino de nia sekcio en Harlemo. Ni kore gratulas la jungeedzojn, kies adreso estas: Witte de Withstr. 62 III, Amsterdam (W.).

NOVAJ EKZERCOJ

Ekzerco 56 A:

(por gekomencantoj):

Kompletigu la vortojn ĉe la krucoj:

Nov+ samidean+ volas komenci korespondad+ kun japan+ samideanin+. Li iras en paperbutik+ por aĉet+ bel+ ilustrit+ kart+. En poŝtoficej+ li aĉetas poŝtmark+. Li skribas la adres+ de japan+ korespondemulin+ sur la kart+. Li trovis tiu+ adres+ en korespondrubrik+ de internaci+ Esperanto-organ+. Li klar+ skribas +ia+ adres+ sur la maldekstr+ duon+ de la kart+. Li gluas 20-cend+ poŝtmark+ sur la kart+. Sur la ali+ flank+ de la kart+ estas bel+ bild+ pri +ia+ loĝlok+. Super +ia+ nom+ kaj adres+ li skribas kelk+ vort+ en Esperant+. Plen+ d+ esper+ li ĵetas la kart+ en la leterkest+ de la poŝtoficej+. Ki+ li ricevos respond+?

Ekzerco 55 B:

(por geprogresintoj):

Kompletigu la vortojn ĉe la krucoj:

1: Intenc+ partopren+ kongres+, oni jam fru+ anonc+ +in. 2: Ne sufiĉ+ fru+ zorg+ pri tio, oni ne trov+ tranoktej+ liber+. 3: Ne hav+ tranoktej+, oni devos resti hejm+. 4: Ne, tio estas triog+, ĉar oni povas elekti i+ ali+. 5: Ne pov+ partopren+ kongres+, oni povas viziti aŭ gastigi eksterland+ samidean(in)+. 6: Est+ kun alilingv+ samidean(in)+ en la sam+ dom+, oni estas devig+ uzi ni+ praktik+ kaj belson+ internaci+ lingv+. 7: Oni povas ankaŭ partopreni en ruz+ elpens+ karuselvojaĝ+. 8: Partopren+ en ti+ rondvojaĝ+, oni estas en internaci+ Esperant+ parol+ societ+ kaj vidas plur+ interes+ land+. 9: Oni povas nomi ti+ karuselvojaĝ+ rondvojaĝ+ internaci+ kongreset+. 10: Ĉu vi estas embaras+, hav+ tiom d+ ŝanc+ de internaci+ renkontiĝ+?

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu (kun afrankita koverto por la resendo!) al la kompiladanto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn, Waltaweg 3, TJERKWERD (Fr.). Tel.: 0 5157 - 9146.

SCHRIFTELIJKE KURSUS
in samenwerking met de
Leidse Onderwijs-Instellingen
Inlichtingen en aanmeldingen:
Alleen via ons sekretariaat:
Mej. Th. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, Tel. 02500/57433,
HAARLEM.



1 = la karuselvojaĝo
2 = la publiko
3 = la esperanto-movado

La karuselvojaĝo estas tutnova sistemo de vojaĝo precipe por geesperantistoj. Ĝi estas same alloga por la gepartoprenantoj kiel por la esperanto-movado. Petu prospekton ĉe la peranto Hans Bakker, v. Tuyll v. Serooskerkenplein 33, Amsterdam-Z. (Nederland).

Vi nun povos ludi post 3 monatoj!

Pianon — Harmoniumon — Akordionon — Gitaron

Kial ne ĝui la neelĉerpeblajn plezurojn de mem lertece ludi instrumenton? — Nun estas nekredeble facile ludi tuj laŭnote ĉiujn specojn de muziko, kiujn vi ŝatas.

En kelkaj monatoj vi jam povas ludi pli multe da muziko, pli lerte kaj pli facile, ol post tri-jara sukcesinta studado per la tradica metodo.

Centmiloj da muzikamantoj jam ludas per **Klavarskribo**, kaj ĉiu muziko, kiu ne estas preskaŭ tute nekonata, jam estas havebla en la nova skribo; ankaŭ plej eminentaj verkoj de la grandmajstroj, piano- kaj violonkoncertoj, oratorioj, la nova filmmuziko kaj la moderna dancmuziko, studmuziko kaj etudoj ĝis la plej altaj gradoj, religia muziko k.t.p., entute pli ol 12.000 eldonaĵoj, inter kiuj multaj albumoj, ofte bele binditaj.

Multnombraj muzikinstruistoj en diversaj landoj jam instruas siajn lernantojn laŭ Klavarskribo.

Konciza kompendio en Esperanto por ludi la klavaron per Klavarskribo je avantaĝega prezo de 1,25 guld. ned.

Skribaj kursoj, vastegaj, malmultekostaj, por multaj instrumentoj en la lingvoj angla, franca, germana kaj nederlanda.

Personoj serioze interesiĝantaj, — muzikamantoj kaj muzikinstruistoj — skribu por nedevigaj informoj al:

Internacia Klavarskribo-Instituto en Slikkerveer (Nederlando) Es.

Bonvolu indiki la instrumenton kaj ĉu „amanto" aŭ „instruisto".

Klavarskribo estas la ĝenerale uzota muzikskribo.
Do lernu ĝin jam nun!!

„ASBESTONA" Florkestoj

Demandu al la
N.V. Holl. Bouwstoffen-Groothandel,
J.v. Oldenbarneveldtlaan 42,
Amersfoort, Nederlando,
la adresojn, kie en via urbo ĉi tiuj kestoj estas haveblaj.

HELSINGÖR DANLANDO

La internaciaj feriaj Esp.-kursoj okazos 25/7 ĝis 1/8 '59 en la Internacia Altlernejo de Helsingör. *Kursoj:* Prepara por Cseh-metodaj geinstruistoj, Konversacia kaj Daŭriga. Venu por lerni kaj ĝui belegan semajnon kun gesamideanoj el 10 - 12 diversaj landoj. *Prospekto senpage havebla ĉe L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhöj Danlando.*